

II ORDINARA TEMPO – 19an de januaro 2014

## **JEN LA ŜAFIDO DE DIO, KIU PRENAS SUR SIN LA PEKON DE LA MONDO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

### **El la evangelio laŭ Johano 1,29-34**

**En tiu tempo Johano vidis Jesuon venantan al li, kaj diris: “Jen la Ŝafido de Dio, kiu prenas sur sin la pekon de la mondo! Li estas tiu, pri kiu mi anoncis: Post mi venas Viro, kiu estas pli granda ol mi, ĉar Li ekzistis pli frue ol mi. Kaj mi Lin antaŭe ne konis, sed mi venis bapti per akvo tiucele, ke Li estu montrita al Izraelo”.**

**Poste Johano donis ĉi tiun ateston: “Mi vidis la Spiriton malsupreniranta de la ĉielo, kiel kolombo, kaj tiu Spirito restis sur Li. Mi ne konis Lin, kiam Dio sendis min por bapti per akvo; sed Dio diris al mi: Vi vidis la Spiriton malsupreniranta kaj ŝvebanta super viro: tiu estas la baptonto per la Sankta Spirito. Kaj mi tion vidis, kaj mi povas atesti, ke Jesuo estas la Filo de Dio”.**

Johano kadencigas sian evangelion sekvante la ritmon de la kreado laŭ la libro de Genezo. Estas pro tio ke la hodiaŭa peco komenciĝas per la esprimo “La postan tagon”. Estas la dua tago kaj la evangeliisto kadencigos tiujn tagojn ĝis alveni al la sepa tago, la tago de la kompleteco de la kreado, per la geedziĝo en Kana, kie estos anoncata la nova interligo.

Nu, Johano la Baptisto, *"la postan tagon, vidis Jesuon venantan al li, kaj diris: "Jen la Ŝafido de Dio"*. Johano la Baptisto identigas en Jesuo la ŝafidon de Dio, kion oni celas per tiu ŝafido? Ĝi estas la paska ŝafido, tiu ŝafido kiun Moseo ordonis al sia popolo manĝi dum la paska nokto, ĉar la viando estintus donanta forton por plenumi tiun paŝadon direkte al libero kaj la sango de tiu ŝafido estintus forprenanta de la Hebreoj la morton kiun la detruanta anĝelo tiun nokton estus portonta super la tuta Egiptio.

La viando do por havi la forton paŝi direkte al libero, kaj sango kiu liberigas de la morto. Nu Johano la evangeliisto vidas en Jesuo la ŝafidon de Dio. Multnombros la referencoj en la evangelio al Jesuo kiel paska ŝafido, ekzemple lia morto kiu estos la sama de la horo dum kiu en la templo estis oferbuĉataj la ŝafidoj por la Pasko, la fakto ke al Jesuo neniu osto estos rompata, samkiel estis fiksita por tiu paska ŝafido al kiu oni ne devis rompi la ostojn.

Johano do vidas en Jesuo la ŝafidon de Dio, tiu kies karno donos kapablon kaj forton komenci la paŝadon direkte al la libero, la liberon kaj la eliron, kaj la sangon, kiu ne savos de la fizika morto, sed savos de la definitiva morto. Ĝi konsentos al tiu kiu akceptos tiun sangon vivon de tia kvalito kapabla superi la morton.

Nu, la tasko de la ŝafido de Dio, laŭ Johano, estas *"tiu kiu forprenas la pekon de la mondo"*. Ne temas pri la pekoj de la mondo, kiu donus la signifon de la pekoj de la homoj, sed la peko de la mondo. Estas iu peko kiu antaŭas la alvenon de Jesuo kaj reprezentas iun obstaklon al komunikado inter Dio kaj la homaro. Tiu peko estas la malakcepto de la ofero de la vivpleneco kiun Dio proponas al la homaro, kaŭzita de la aliĝo al iu ideologia, religia sistemo kiu kontraŭas la volon de Dio.

Kaj Johano la Baptisto difinas Jesuon kiel *"tiu, pri kiu mi anoncis: Post mi venas Viro"* do pormomente estas prezentata nur kiel homo. Li diras ke li ne lin konis, sed ke li venis *"bapti per akvo tiucele, ke Li estu montrita al Izraelo."*

Izraelo estadis ĉiam eta grupo fidela al Sinjoro, al la interligo, al liaj promesoj, kaj en la libro de profeto Sofonio legeblas: *"Mi restigos meze de vi popolon humilan kaj mizeran, restaĵon de Izraelo kiu fidus en la nomo de la Sinjoro"*. Kaj je tio restas la promeso de la Sinjoro. Sed tiu promeso kiu estas nun por Izraelo poste kun Jesuo sin adresos de Izraelo al la tuta homaro.

*"Poste Johano donis ĉi tiun ateston: "Mi vidis la Spiriton" la artikolo indikas la totalecon de la Spirito, nome la dian energion, la plenecon de la forto de Dio, tio estas la amon, " malsupreniranta de la ĉielo, kiel kolombo" ni memoru ke la kolombo referencas kaj al la Spirito kiu suprenŝvebis la kreadon en la rakonto de Genezo, kaj al la ligo de la kolombo por ĝia nesto "kaj tiu Spirito restis sur Li"*

Gravas kiel la evangeliisto substrekas ne nur la fakton ke la Spirito malsupreniras super Jesuon, sed ke ĝi restis. Kion tio volas diri? La sperto de la Spirito eblas al pluraj, sed nur tiu super kiu tiu Spirito restas, tiu povas tion komuniki al alia; tio estos fakte la agado de Jesuo kiun ni nun vidos.

*"Mi ne konis Lin, kiam Dio sendis min por bapti per akvo; sed Dio diris al mi: Vi vidos la Spiriton malsupreniranta kaj ŝvebanta super viro" ... jen refoje la evangeliisto substrekas ke, ne nur la Spirito, tio estas la forto, la povo de Dio malsupreniras super Jesuon, sed ĝi super li restas. Li daŭrigas laŭvorte "... tiu estas la baptono per la Sankta Spirito".*

La evangeliisto metas paralele la esprimon uzatan "tiu kiu forprenas la pekon de la mondo" kun "tiu kiu baptos en la Sankta Spirito". Tiu peko ne devas esti elpagita sed ĝi devas esti elradikigita. Kiel? Ne pere de lukto, ne pere de perforto. Johano jam skribis en sia prologo ke la lumo brilas inter la mallumo, la lumo ne batalas kontraŭ la mallumo; la lumo limigas sin brili kaj la mallumo forvaporigas.

La agado de Jesuo estas bapti en la Sankta Spirito. Dum la bapto en la akvo signifis sin mergi en iun likvaĵon kiu estis ekster la homo, la bapto en la Sankta Spirito signifas lasi sin impregni, trempi per la pleneco de la dia povo kiu venas de Dio pere de Jesuo. La agado de Jesuo do estas komuniki al ĉiu persono lian dian vivon mem.

Dum super Jesuon malsupreniras la forto de Dio, la Spirito, la agado de Jesuo estas bapti en Sankta Spirito; 'Sankta' indikas ne nur la kvaliton, la sanktecon de tiu Spirito, sed ĝian agadon sanktigi, tio estas dividi tiujn kiuj akceptas tiun Spiriton, disde la sfero de la malbono, disde la sfero de la mallumo. La agado de Jesuo do estas komuniki sian saman Spiriton.

Kiam tiu Spirito estas akceptita en la persono, tiu iĝas ŝprucanta fonto kiu komunikas, ĉiam plie, daŭre kaj superplene, la dian vivon. Kaj konkludas la peco "Kaj mi tion vidis, kaj mi povas atesti, ke Jesuo estas la Filo de Dio". Tiu kiu estis anoncata nure kiel Viro, "post mi venas Viro, kiu estas pli granda ol mi", nun estas malkaŝita kiel la filo de Dio.

Post kiam estas malsuprenirinta la pleneco de la Sankta Spirito, en Jesuo estas la pleneco de la dia kondiĉo kaj Jesuo plene manifestas la realecon de Dio.